

## Paraliziĝo de la mondorganizaĵoj, ekzemplo de Monda Organizo pri Sano laŭ alvoko de Claude Piron

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 616, 1975.07.30 & 08.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Parolante antaŭ la Asembleo de Monda Organizaĵo pri Sano la 20-an de majo, blindulo, Sir John Wilson, prezidanto de Monda Organizaĵo kontraŭ Blindeco, klarigis, ke tute modera investo ebligus savi la vidpovon de milionoj da homoj. Kuraci trakomon, ĉefan kaŭzon de blindeco en la mondo, kostas nur po 0,50 usonajn dolarojn por persono ; protekti la okulojn de infanoj minacataj de kseroftalmio (ĉefa kaŭzo de blindeco ĉe infanoj) ne kostas pli ol po 0,12 usonajn dolarojn jare por infano ; en Hindio oni redonis la povon vidi al dekdu mil kataraktuloj koste de po 5 usonaj dolaroj por operaciito. Ĉu ne estas skandale, ke oni ne sukcesas kolekti la necesan monon por kontraŭbatali tiujn malsanojn kaj por savi la vidon al milionoj da homoj ?

A.- La delegitoj de la 145 ŝtatoj aŭskultis sen eĉ moviĝeti, sendube malĝojaj pri la neeblo trovi la monon necesan por malpezigi tiujn suferojn. Sed la 28-an de majo, do ok tagojn pli malfrue, tiuj samaj delegitoj alprenis du rezoluciojn celantajn havigi al la araba kaj al la ĉina la pozicion de laborlingvoj, kiu decido kostas al MOS po kvin milionojn da dolaroj jare, tio estas sufiĉe por savi la vidpovon al dek milionoj da homoj trafitaj de trakomo.

Cl.- Aspektas, kvazaŭ ni ĉeestus prestidigitan spektaklon : Ĉu vi volas zorgi pri l' bonfarto de l' popoloj ? Mono estas nevidebla ! Ĉu vi volas pagi interpretistojn, tradukistojn kaj tunojn da papero ? Ek ! Jen mono videblas enkase ! Tiuj kvazaŭmagiaj mal- kaj re-aperoj instigis lingviston/psikologon instruantan ĉe Ĝeneva Universitato, sinjoron Claude Piron, direkti la 26-an de junio 1975 al la ĝenerala direktoro de MOS *Nefermitan Leteron*, kiun ni resume citas al vi :

A.- « *La internaciaj organizaĵoj, la aŭtoro opinias, suferas pro mensmalsano nomata Babelo, kiu sorbas grandegan procenton de iliaj financaj rimedoj malprofite al la agado, por kiu ili kreiĝis.*

Cl.- *Ekzemple MOS rezignis, pro manko de mono, je la sekvantaj projektoj, inter multaj aliaj : Gvineo, higiena ekipo de Conacry – 165 280 usonaj dolaroj ; Malajzio, readaptado de fizikaj handikapitoj – 130 500 dolaroj ; Birmo, lukto kontraŭlepra – 83 000 dolaroj. MOS do, la letero emfazas, ne povas trovi 26 000 usonajn dolarojn por havigi sanan akvon al la loĝantaro de ekonomie malfavorata lando aŭ por tie konstrui kloak-reton, sed ĝi pretas dediĉi kvin milionojn da dolaroj jare al pure administra aŭ kunsida laboro. Tamen, higieno estas bazo de publika sano, kaj akvo prezentas per si ŝlosilan faktoron por higieno. [...]*

A.- *Kiel do ŝpari la milionojn senfrukte alskribitajn al plurlingvismo ne privilegianta iun ajn nacion lingve ? Solvo ekzistas, kaj ĝia taŭĝeco estas pruvita praktike. Bedaŭrinde antaŭjuĝoj ĝis nun malhelpis apliki ĝin sur interregistara nivelo. La nefermita letero petas la ĝeneralan direktoron studi ĝin objekte, kun la tuta necesa scienca rigoro.*

Cl.- Tiu solvo, kiel vi divenas, estas nia lingvo Esperanto. Sinjoro Claude Piron raportas pri ĝia lernfacileco, pri la kongresoj, ktp. *Pri la Universala Kongreso nun disvolviĝanta en Kopenhago, li skribis : Vi povos ĉeesti diskutojn, kiuj estos same internaciaj kiel ĉe la Monda Saneca Asembleo, sed kies traduk- kaj interpret-kostoj sumiĝas je 0000,- dolaroj. [...]* Ĉe la

*Internacia Somera Universitato, kunvenonta kadre de l' Kongreso, universitataj profesoroj el la tuta mondo prezentos prelegojn esperantlingve pri temoj de sia fako. Vi vidos, ke Babelo venkiĝis : la terapio efikas !*

*A.- Kiel ĝin apliki praktike ? Decidante, ke post dek jaroj la sola lingvo allasata en la kunsidoj kaj dokumentoj de la internaciaj organizaĵoj estos Esperanto. La simpla ekzisto de tiu deklaro igos la koncernajn ministeriojn organizi la instruon de la lingvo internacia. La ceteraj problemoj solviĝos pro la simpleco mem de la lingvo. Apogite sur tia deklaro Esperanto rapide disvastiĝos tutmonde.*

*Cl.- Sinjoro Claude Piron, kiu delonge praktikas Esperanton, opinias, ke *babelo estas vera malsano, apartenanta al la fako socipsikiatria : Nur psikopatologia faktoro povas klarigi, ke homoj, fronte al problemoj kun gravaj konsekvencoj humanaj kaj financaj, apriorie rifuzas konsideri solvon, kies taŭgeco facile kontroleblas.* Kaj li konkludas : *En mondo, kie malsano kripligas tiom da homoj, necesas prioritare plenumi la praktikajn, surterajn agadojn, kaj ne plipezigi la amnistiajn aŭ kunsidajn laborojn.**

*A.- Ekzistis tempo, kiam la diskutoj pri Esperanto ŝvebis en alta sfero teoria. La evoluo de la internaciaj rilatoj tion ŝanĝis. Hodiaŭ la demando temas pri sano aŭ sufero, pri vido aŭ blindeco, por milionoj da homoj. Espereble, la respondeculoj pri por-saneca agado en la mondo kapablos savi sin el sia mensa blindeco por kuraĝi rigardi rekte al ĉiuj donitaĵoj de l' problemoj kaj al ĉiuj eblaj solvoj, konkludas Claude Piron.*

*Cl.- Kultura Centro Esperantista, kies sidejo troviĝas en la urbo La Chaux-de-Fonds, apogis la agadon, kiun entreprenis sinjoro Claude Piron, dissendante la raporton, kies fragmentojn vi ĵus aŭdis, al la gazetaro, al politikistoj kaj al la ĉefaj esperanto-organizaĵoj. Ĝi avertis pri tiu diskoniga agado la direktoron de Monda Organizaĵo pri Sano.*

*A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!*

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*